

Tiu interna sinteno kaj la konsekvenca plialtiĝo de nia ĝojo-nivelo spontane gvidas nin al nova ekstera konduto. Kun nia ĝojo kreskas ankaŭ niaj fortoj. Laborojn, kiujn ni antaŭe faris nur spiregante, ni plenumas nun ludante. Malhelpaĵoj, kiuj antaŭe malekvilibris nin, nun nur kaŭzas nian gajecon. Ĉar kun niaj pretendoj ankaŭ niaj bezonoj malpliigas, ne estas plu malfacile por ni kontentigi ilin. Tiel ni gajnas tempon kaj ideojn pri aliaj aĵoj. Per tio nia estaĵo plivastiĝas trans la limojn de nia korpo. La observo, ke ĝojigo pliigas la propran ĝojon, montras al ni, ke ni estas mistere interligitaj kun la homoj de nia ĉirkaŭaro. Pli kaj pli ni eksentas nin kiel membroj de la tuto kaj ekkondutas nin konvene.

Tiu nivela plialtiĝo de nia konduto iom post iom transformas ankaŭ nian ĉirkaŭaron. Kiel resonance ni nun vekas en la samaj homoj pozitivajn emociojn, kiujn ni antaŭe ekkonis nur de la negativa flanko. Aliaj, kiuj antaŭe estis por ni neatingeblaj, serĉas nun nian rondon kaj novaj viveblecoj prezentas sin, kiuj superas niajn plej idealajn revojn.

(Aŭtora traduko el »Psychophysikalische Zeitschrift« — PZ, jarserio 5, n-ro 2).

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio  
Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

4.091 (048.1)

### ESEO PRI INTERLINGVISTIKA BIBLIOGRAFIO

(A. Lienhardt, Francio)\*

La aktualecaj artikoloj »Interlingvistiko — scienco aŭ iluzio?« de M. W. PIETRZAK (Varsovio) kaj »Freŝa vento en lingvoscienco« de R. SIKORSKI (Omsk), aperintaj en SCIENCA REVUO EN ESPERANTO n°65 (majo 1966) donas enrigardon en relative novan sciencon, kies celo estas studi la teoriajn kaj praktikajn aspektojn de ĉio kio rilatas al interlingvoj.

#### Kio estas interlingvo?

La termino »interlingvo«, nuntempe ankoraŭ ne larĝe konata kaj uzata, elvokas postulon pri klarigo.

Laŭ la difino de M. W. PIETRZAK, interlingvo estas »(unu) lingvo internacia, kiu estas uzata kaj instruata apud lingvo nacia.«

Serĉante nacilingvajn ekvivalentojn de tiu termino, oni trovas francan (F) kaj anglan (A) kun la jenaj difinoj:

— *interlangue* (F) = langue conventionnelle s'insérant entre les langues existantes et suppléant à celles-ci dans les relations internationales (=Konvencia lingvo lokiĝanta inter la ekzistantaj lingvoj kaj anstataŭiganta ilin en la internaciaj interrilatoj). Tiu difino troviĝas en la libro »Précis d'interlinguistique«, pri kiu ni reparolos poste;

— *interlanguage* (A = a language for world intercourse (=lingvo por tutmondaj interrilatoj). Tiu difino troviĝas en la 2a eldono de la konata angla enciklopedio »Webster's Unabridged English Dictionary«. La sama termino estas trovebla en diversaj publikaĵoj precipe usonaj, ekzemple en la libro »Esperanto, the world-interlan-

\* ) 24 avenue de Riedisheim, F-68 MULHOUSE

guage» (eld. Beechurst Press, New York, 1949), kaj en la gazetoj »American Esperanto Magazine« kaj »The International Language Review« (kiun mi ree mencios poste).

Oni ne povas nei, ke la konciza termino »interlingvo« (kaj ankaŭ ties nacilingvaj ekvivalentoj) estas pli adekvata ol la tro larĝsenca »internacia lingvo« ĝis nun preskaŭ ĝenerale uzata.

### Kiu(j) lingvo(j) estas interlingvo?

Fakto konata estas, ke relative multaj lingvoj, apartenantaj al du apartaj lingvogrupoj, aspiras ludi la rolon — laŭeble ekskluzive — de tutmonda interlingvo:

a) la etnaj grandlingvoj (nuntempe la angla, la rusa, la franca, la hispana, la germana, k. a.)

b) diversaj planlingvoj, t. e. planitaj lingvoj, ankaŭ nomitaj artefaritaj (G: Plansprachen; F: langues planifiées; A: planned languages) nome Esperanto kaj ties posteuloj Ido, Occidental, Interlingua, k. a.

»grandajn« nacilingvojn; la interesataj ŝtatoj — pro konataj hegemoniaj tendencoj — jam zorgas por tio, atribuante konsiderinde altajn monsumojn al la speciala sekcio de siaj ministerioj por eksterlandaj aferoj... Nia intereso rilatas efektive nur al la dua lingvogrupo, tiu de la planlingvoj sisteme ellaboritaj cele de uzado kiel helplingvo apud la nacilingvoj, do unuavice Esperanto, sufiĉe altstara por meriti la nomon de »interlingvo universala« (universala en la senco de: por ĉio kaj por ĉiu).

### Pri interlingvistika bibliografio

La bazo de ĉiu scienco estas la tiurilata bibliografio, t. e. la tutaĵo da dokumentoj kaj publikaĵoj (libroj, artikoloj, akademiaj komunikaĵoj) aperintaj pri la koncerna temo. Ĉar ne ĉiam estas facile por specialistoj diskovri ĉiujn fontojn tute sola, la celo de tiu artikolo estas prezenti kelkajn bibliografiajn informojn pri la ĵus-nuna temo, laŭeble kompletigotajn iom post iom fare de diverslandaj kompetentuloj kunlaboremaj. (Oni bonvolu noti, ke la komentoj, komplemente aldonitaj jen-sekve, respegulas la personan vidpunkton de la subskribinto kaj ne celas vekti polemikojn).

#### I) Libroformaj publikaĵoj:

L. COUTURAT kaj L. LEAU, »Histoire de la langue internationale« (=Historio de la internacia lingvo). — Franclingva. — Eld. Hachette, Paris, 1903 kaj 1907. — Elĉerpita. — Unua grava verko pri interlingvistiko. — (Estus utile ricevi pli detalajn informojn.)

G. KOLOWRAT, »Faut-il réformer l'Espéranto?« (=Ĉu estas necese plibonigi Esperanton?). — Franclingva. — Eld. Presa Esperan-

tista Scioto, Paris, 1908. — 24 paĝoj. — Elĉerpita. — Argumentoj kontraŭ eventualaj ŝanĝoj en Esperanto.

G. KOLOWRAT, »Pri la derivo en Ido kaj Esperantot«. — En Esperanto. — Eld. Presa Esperantista Societo, Paris, 1909. — 12 paĝoj. — Elĉerpita. — Kolekto da ekzemploj por montri la naturan vorto-derivadon en Esperanto, kontraŭe al tiu en Ido.

Th. CART, »A la recherche d'une langue internationale« (Subtolo: Sur la vojo al internacia lingvo). — Teksto franca kaj Esperanta. Eld. Presa Esperantista Societo Paris, 1909, — 24 paĝoj. Elĉerpita — La aŭtoro, estinta universitata profesoro kaj konata Esperanto-pioniro, pritraktas en la paragrafo IV: »Pri la elektro de artefarita lingvo kaj pri la kondiĉoj, kiujn ĝi devas plenumi — Esperanto sole plenumas tiujn kondiĉojn kaj ĉiujn tute.«

C. AYMONNIER, »Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles« (= Studo pri kompara derivado en la lingvoj naturaj kaj artefaritaj). — Franclingva. — Eld. Office Central Espérantiste, Paris, 1921. — 132 paĝoj. — Elĉerpita. — La aŭtoro estis universitata profesoro kaj membro de la Esperanto-Akamedio. Per tre detala esploro li montras, ke la vorto-derivado en Esperanto estas pli konforma al la reguloj en la naturaj (t. e. etnaj) lingvoj, ol la derivado en Ido. Konklude li reliefigas, ke la Idisma teorio pri reciprokeco en la derivado estas iluzia kaj nenial necesa.

E. DREZEN, »Historio de la mondlingvo«. — En Esperanto. — Eld. (?), Leipzig, 1931. — Verŝajne elĉerpita. — Unu el la fundamentaj verkaĵoj pri interlingvistiko. — (Estus utile ricevi pli detalajn informojn.)

Dr. — Inĝ. E. WÜSTER, »Internationale Sprachnormung in der Technik« (=Internacia lingvo-normigo en la tekniko). — Germanlingva. — Unua eldono: VDI-Verlag, Berlin NW 7, 1931; 412 paĝoj. — Dua eldono: H. Bouvier Verlag, Bonn, 1966; ofseta represaĵo plus 56-paĝa komplemento »Fünfunddreissig Jahre später« (=35 jaroj poste). — Tiu impona kaj grava verkaĵo, renoma en fakulaj rondoj, enhavas 130-paĝan ĉapitron specialan pri interlingvoj (etnaj lingvoj kaj planlingvoj). Esperanto estas aparte detale pritraktita.

Dr. Inĝ. E. WÜSTER, »Mezdunarodnaja standartizacija jazyka v tehnika«. Ruslingva traduko de la ĵas menciita libro. — Eld. (?), Moskvo, 1935. — Pluaj detaloj mankas.

G. A. CONNOR & W. SOLZBACHER, »Esperanto: the world interlanguage« (= Esperanto: la tutmonda interlingvo). — Anglalingva. — Eld. Beechurst Press, New York, 1948. — 245 paĝoj. — Elĉerpita. — Enhavo: 1) Language and interlanguage — 2) Practical textbook of Esperanto — 3) The modern Esperanto reader — 4) Guide book

for the practical Esperantist — 5) Esperanto-English dictionary — 6) English-Esperanto dictionary. — Recenzoj aperis en 1948 en diversaj Esperanto-gazetoj.

Dr. W. MANDERS, »Vijf kunsttaalen« (= Kvin planlingvoj). — Nederlandlingva tezo por doktoriĝo. — Eld. (?), Utrecht, 1947. — Kompara studo inter Esperanto kaj kvar posteuloj. — (Detaloj mankas.)

Dr. W. MANDERS, »Interlingvistiko kaj Esperantologio«. — En Esperanto. — Eld. J. Muusses, Purmerend, Nederl., 1950. — 77 paĝoj. — Elĉerpita. — Detala recenzo aperis en SCIENCA REVUO n°6, kaj komplementa artikolo en n°7/1950. — Interesas ĉiujn seriozajn interlingvistojn.

Dr. A. BAUR, »Das Problem der internationalen Sprache« (= La problemo pri la internacia lingvo). — Germanlingva. — Represaĵo el »Jahrbuch der Eidgenössischen Räte«; eld. Verbandsdruckerei, Bern, Svizl., 1953. — 20 paĝoj. — Traktato ĝeneral-informa, kun speciala atento je Esperanto.

M. A. PEI, »One language for the world« (= Unu lingvo por la mondo). — Anglalingva. — Eld. Dewin-Adair, New York, 1958. — La aŭtoro estas renoma usona lingvisto, profesoro ĉe Columbia-Universitato. — (Pluaj detaloj estas dezirindaj.)

C. AGOSTINO kaj P. MARELLI, »Il latino lingua internazionale?« (= Ĉu la latina povas fariĝi lingvo internacia?). — Itallingva. — Eld. Itala Esperanto-Federacio, Torino, 1959. — 32 paĝoj. — La konkludo estas nea por la latina, kaj jesa por Esperanto.

G. WARINGHIEN, »Lingvo kaj vivo«. Esperantologiaj eseoj. — En Esperanto. — Eld. J. Regulo Perez, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1959. — 450 paĝoj. — Tiu libro, kies aŭtoro estas agregaciulo pri la angla lingvo kaj nuna prezidanto de la Esperanto-Akademio, estas unu el la plej gravaj en kaj pri Esperanto, nepre koninda kaj studinda. Aparte atentindaj ĉapitroj: »La akuzativo en interlingvistiko — La naciaj lingvoj kaj la internacia — Esperanto kaj ĝiaj konkurantoj.«

Dr. M. MONNERET-DUMAINE, »Précis d'interlinguistique générale et spéciale« (= Epitomo pri ĝenerala kaj speciala interlingvistiko). — Franclingva. — Eld. Librairie Maloine, Paris, 1960. — 210 paĝoj. — Objektiva kaj tre detala studverko pri la ĉefaj planlingvoj kaj pri pluraj centoj da planlingvo-projektoj, kun multaj tiurilataj lingvo-specimenoj kaj kompara kritiko. Tiu grava kompendio, havinda de ĉiu lingvofakulo, estas preskaŭ kompleta fonto pri la ĝisnunaj realigaĵoj sur la interlingvistika kampo. Samtempe ĝi reprezentas elokventan demonstron, ke la klopodoj de la »plibonigistoj« strebantaj al »plene perfekta kaj tutmonde kontentiga« interlingvo estas utopiaj, ĉar la (supozitaj) plibonigoj elpensitaj de iu unuopulo (eĉ alte intelekta) ne nepre plaĉas al ĉiuj aliaj, kiuj adoptu ilin. Ĉiuj tiaj klopodoj

do vole nevole estas kondamnitaj al fiasko, rezultigas displitiĝon de la samcelaj fortoj, kaj bremsas senfine la oficialan tutmondan agnoskon de unu interlingvo entute sufiĉe bona kaj ĝenerale kontentiga, kiel ja estas Esperanto. Ni ne perdu nian tempon kun Ido, la ido de Esperanto, kaj la jam multaj idoj de Ido povre vegetantaj, sed centrigu niajn fortojn al ĝeneraligo de la uzado de Esperanto kaj lasu al venontaj generacioj la plezuron poluri la »oficialan interlingvon tutmondan«, se tio amuzos ilin...

A. CAUBEL, »La raison contre Babel« (= La racio kontraŭ babelismo). — Franclingva. — Eld. Cahiers Rationalistes, 24 rue Grands-Augustins, Paris, 1961. — 40 paĝoj. — Serioza kaj objektiva studaĵo. Aparte menciinde estas la ĉapitro: »Histoire naturelle des langues artificielles« (= Natura historio de la artefaritaj lingvoj).

P. BURNEY, »Les Langues internationales« (= La internaciaj lingvoj). — Franclingva. — Eld. Presses Universitaires de France, Collection »Que sais-je?«, Paris 1962. — 128 paĝoj. — La aŭtoro, profesoro ĉe la Franca Instituto en Athinai (Grekujo) dediĉis la plej grandan parton de sia verkaĵo al grandaj nacilingvoj pli malpli rolantaj kiel interlingvo; pli ol 50 paĝoj gloras la francan lingvon. Pri la diversaj planlingvoj oni trovas magrajn informojn sur nur 16 paĝoj. Tio sendiskute ilustras la subjektivecon de la aŭtoro, kies verkaĵo ĉi tie menciita do ne povas servi kiel fidinda fonto por seriozaj esplorantoj sur la interlingvistika kampo.

A. CHEDEL, »Description moderne des langues du monde« (= Moderna priskribo de la lingvoj de l'mondo). — Franclingva. — Eld. Perret-Gentil, Genève, 1965. — 202 paĝoj. — 1) Le langage et les langues — 2) Portrait des langues — 3) Variétés linguistiques. — Tre objektiva kaj funde esploranta verkaĵo pri la ĉefaj lingvoj estintaj kaj nuntempaj. — La aŭtoro finas la lastan ĉapitron per la vortoj tute favoraj al esperanto. — En la bibliografia listo figuras 13 franclingvaj libroj pri lingvistiko.

(Listo daŭrigota)

## II) Periodaj publikaĵoj:

»Interlingvistika Informa Servo« (1957-1966...). — Kvaronjara, multobligita. — En Esperanto. — Eld. Societo por Internacia Lingvo, Jens-Due Str. 25, D-239 Flensburg (Germanujo).

»The International Language Review« (1953-1966...). — Dumonata, multobligita. — Artikoloj en la angla kaj eble aliaj nacilingvoj; rubrikoj en Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua kaj Neo.

(Listo eventuale daŭrigota)

La subskribinto danke akceptos ĉiujn informojn, kiuj ebligos kompletigi kiel eble plej celserve la 2 ĉi-supre komencitajn listojn.